





Fjordlanda Nacia Parko, en Nov-Zelando



# Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 2002  
Numero 55 (vol. 10, no. 1)



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj  
Numero 55 (volumo 10, numero 1), Januaro-Februaro 2002

Redaktoro: Donald Broadribb  
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio  
☎: (08) 9641 1937  
Faksoj: (08) 9641 1134  
E-poŝto: [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

## Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,  
143 Lawson St, Redfern, NSW 2016,  
Aŭstralio. E-poŝte:  
[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road,  
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:  
[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso [sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org); vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mg aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitaĵajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

**La kovrilbildo:** Unu el la multaj naturaj pejzaĝoj de Nov-Zelando kiuj altiras atenton pro sia beleco.

## EN ĈI TIU NUMERO

### Artikoloj:

Humpti Dumpti (ĉapitro el <i>Trans la Spegulo</i> de Lewis Carroll) .....	3
Trevor Steele ĉe UEA.....	8
Honoro al William Auld.....	9
Nekrologo: W. Dudley Parkinson (de Eric Bantick).....	10
Skribas la legantoj.....	11
Kiel instali programon (de Dave Barry) .....	19
Nia konkurso: rezultoj? .....	21
Gramatika angulo (de Marcel Leereveld).....	21
El la regionoj.....	25
Odlo Bokserp: Liaj paĝoj .....	26

### Recenzoj:

<i>La libro de la mirindaĵoj</i> , de Marko Polo .....	12
<i>Maskerado ĉirkaŭ la morto</i> , de Tivadar Soros .....	13
<i>Annirudha rakontas</i> , de Annirudha Banhatti .....	15
<i>Trans la spegulo</i> , de Lewis Carroll	16

### English Supplement:

*For the beginner: Problems of Pronunciation*

ESK estas legebla per Interreto:  
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la marto-aprila numero: 10 februaro.

## Humpti Dumpti (ĉapitro el *Trans la spegulo* de Lewis Carroll)

Tradukis Donald Broadribb

Tamen, la ovo nur pli kaj pli grandigis, kaj pli kaj pli homiĝis: kiam ŝi estis ĉirkaŭ kelkajn metrojn for de ĝi, ŝi vidis ke ĝi havas okulojn kaj nazon kaj buŝon; kaj kiam ŝi apudiĝis, ŝi vidis klare ke temas pri HUMPTI DUMPTI mem. “Ne povas esti iu alia!” ŝi diris al si. “Mi estas egale certa, kiel se lia nomo estus skribita sur lia tuta vizaĝo!”

Ĝi facile skribiĝus centoble sur tiu enorma vizaĝo. Humpti Dumpti sidis, kun siaj kruroj krucitaj kiel Turko, sur la supro de alta muro — tiel mallarĝa muro ke Alico vere ne komprenis kiel li ekvilibrigas sin — kaj, ĉar liaj okuloj fikse rigardis laŭ la kontraŭa direkto, ŝi decidis ke verŝajne li ja estas nur pupo.

“Kaj kiel precize kia ovo li estas!” ŝi diris pervoĉe, starante kun siaj manoj etenditaj prete kapti lin, ĉar ŝi ĉiumomente anticipis ke li ekfalos.

“Estas *tre* provoke,” Humpti Dumpti diris post longa silento, for rigardante de Alico dum li parolis, “nomiĝi ovo — *tre* !”

“Mi diris ke vi *aspektas* kiel ovo, Sinjoro,” Alico trankvilige klarigis. “Kaj kelkaj ovoj estas *tre* belaj, sciu,” ŝi pludiris, esperante ŝanĝi sian komenton en ian komplimenton.

“Kelkaj homoj,” diris Humpti Dumpti, forrigardante de ŝi kiel kutime, “ne estas pli saĝaj ol bebo!”

Alico ne sciis kion diri responde al tio: ne similis al konversacio, ŝi pensis, ĉar li neniam parolis al ŝi; efektive, lia lasta komento ŝajnis celi arbon — do ŝi staris kaj nelaŭte deklamis al si:

*Humpti Dumpti sidis sur mur’*,

*Humpti Dumpti falis de sur.*

*Regaj ĉevaloj, soldatoj lin provis*

*Remeti sur muron sed ili tute ne povis.*

“Tiu lasta linio estas multe tro longa por la poemo,” ŝi pludiris, preskaŭ pervoĉe, forgesante ke Humpti Dumpti aŭdos ŝin.

“Ne staru tie babilante al vi,” Humpti Dumpti diris, unuafoje rigardante ŝin, “sed diru al mi vian nomon kaj vian celon.”

“Mia nomo estas Alico, sed —”

“Sufiĉe stulta nomo!” Humpti Dumpti interrompis senpacience. “Kion ĝi signifas?”

“Ĉu nomo *devas* signifi ion?” Alico demandis dubeme.

“Kompreneble ĝi devas,” Humpti Dumpti diris kun nelonga rido: “*mia* nomo signifas mian formon — kaj bona bela forma ĝi ja estas. Kun nomo kia via, vi povus esti kia-ajn-forma, preskaŭ.”

“Kial vi sidis ĉi tie tute sola?” diris Alico, ne volante komenci kverelon.

“Nu, ĉar neniu estas kun mi!” kriis Humpti Dumpti. “Ĉu vi supozis ke mi ne scias la respondon al *tio*? Demandu alian.”

“Ĉu vi ne opinias ke vi estus pli sekura sur la tero?” Alico daŭrigis, ne intencante demandi novan enigmon, sed simple pro sia bonhumora maltrankvileco por la stranga ulo. “Tiu muro estas *ege* mallarĝa!”

“Vi ja faras nekredeble facilajn enigmojn!” Humpti Dumpti grumbilis. “Kompreneble mi ne opinias tion! Nu, se iam mi ja falus — kio tute ne povos okazi — sed se mi falus —” Nun li faltigis siajn lipojn, kaj aspektis tiel



solena kaj fera ke Alico apenaŭ ne povis ne ridi. “Se mi ja falus, li pludiris, *“la Reĝo promesis al mi — ha, paliĝu se vi volas! Vi ne supozis ke mi diros tion, ĉu? — La Reĝo promesis al mi per sia propra buŝo — ke — ke —*”

“Ke li sendos ĉiujn siajn ĉevalojn kaj soldatojn,” Alico interrompis, iom nesage.

“Nu mi deklaras ke tio estas fiega!” Humpti Dumpti kriis subite ekpasiĝante. “Vi subaŭskultadis ĉe pordoj — kaj malantaŭ arboj — kaj en kamentuboj — alie vi ne povus scii tion!”

“Tute ne!” Alico diris tre trankvile. “Ĝi estas en libro.”

“Ha, nu! Eble oni verkas tiajn aferojn en *libro*,” Humpti Dumpti diris pli trankvile. “Tion oni nomas Historio de Anglio, tion. Nu, bone rigardu min, mi estas persono kiu parolis al Reĝo, *mi* estas: eble vi neniam vidus alian: kaj por montri al vi ke mi ne fieras, vi rajtas premi mian manon!”

Kaj li ridetis de unu orelo al la alia, dum li antaŭen klinis sin (kaj laŭeble preskaŭ falis de la muro dum li faris tion) kaj proponis al Alico sian manon. Ŝi observis lin iom maltrankvile dum ŝi prenis ĝin. “Se li iom pli ridetus la finoj de lia buŝo povus rendevui malantaŭ lia kapo,” ŝi

pensis: “kaj mi ne scias *kio* okazus al lia kapo tiam! Mi timas ke ĝi forfalus!”

“Jes, ĉiujn siajn ĉevalojn kaj soldatojn,” Humpti Dumpti daŭrigis. “Ili jam tuj levus min, *ili!* Tamen, ĉi tiu konversacio iom tro rapidas: ni reiru al la antaŭlasta komento.”

“Mi timas ke mi ne klare memoras ĝin,” Alico diris, tre ĝentile.

“Tiukaze ni rekomencu,” diris Humpti Dumpti, “kaj estas mia vico elekti temon —” (“Li parolas kvazaŭ temus pri ludo!” pensis Alico.) “Do jen demando por vi. Laŭ via diro, kiom-jara vi estas?”

Alico rapide kalkulis, kaj diris, “Sep jaroj kaj ses monatoj.”

“Erare!” Humpti Dumpti triumfe kriis. “Vi tute ne diris ion tian!”

“Mi kredis ke vi celas diri ‘Kiom-jara vi estas?’” Alico klarigis.

“Se mi celus tion, mi dirus tion,” diris Humpti Dumpti.

Alico ne volis komenci novan kverelon, do ŝi nenion diris.

“Sep jaroj kaj ses monatoj!” Humpti Dumpti ripetis penseme. “Malkomforta aĝo. Nu, se vi petus *mian* konsilon, mi dirus ‘ĉesu je sep jaroj — sed nun estas tro malfrue.’”

“Mi neniam petas konsilon pri kreskado,” Alico diris indigne.

“Tro fiera?” la alia demandis.

Alico sentis sin eĉ pli indigna pro tiu sugesto. “Mi celas diri,” ŝi diris, “ke ne eblas ne pliaĝiĝi.”

“Al *unu* persono eble ne,” diris Humpti Dumpti, “sed jes al *du*. Per taŭga helpo, eble vi povus esti ĉesinta je sep jaroj.”

“Kian belan zonon vi havas!” Alico subite komentis. (Jam estis tute sufiĉa diskuto pri aĝo, ŝi pensis: kaj, se ili efektive alterne elektu temojn,

nun estas ŝia vico.) “Almenaŭ,” ŝi korektis sin, repensante, “belan kravatton, mi diru — ne, zonan, efektive — pardonu min!” ŝi diris malfeliĉe, ĉar Humpti Dumpti aspektis plene ofendita, kaj ŝi komencis voli ne esti elektinta tiun temon. “Se mi nur sciuz,” ŝi pensis, “kio estas kolo kaj kio estas talio!”

Evidente Humpti Dumpti multe koleris, kvankam li diris nenion dum unu-du minutoj. Kiam li ja parolis de nove, li parolis per profunda grumblo.

“Estas — ege — provoke,” li diris fine, “kiam ulo ne scias distingi inter kravato kaj zono!”

“Mi agnoskas ke mi estas tre senscia,” Alico diris, tiom humiltone ke Humpti Dumpti cedis.

“Ĝi estas kravato, infano, kaj bela, kiel vi diris. Ĝi estas donaco de la Blankaj Reĝo kaj Reĝino. Nu!”

“Ĉu vere?” diris Alico, al kiu tre plaĉis la trovo ke ŝi ja elektis bonan temon.

“Ili donis ĝin al mi,” Humpti Dumpti diris penseme, dum li krucis unu kruron per la alia, kaj ĉirkaŭmetis siajn manojn, “ili donis ĝin al mi — kiel nenaskiĝtagan donacon.”

“Pardonu?” Alico diris perpleksite.

“Mi ne estas ofendita,” diris Humpti Dumpti.

“Mi volas diri, kio estas nenaskiĝtaga donaco?”

“Donaco donita kiam ne estis via naskiĝtago, kompreneble.”

Alico pripensis iomete. “Mi preferas naskiĝtagajn donacojn,” ŝi diris fine.

“Vi ne scias kion vi diras!” kriis Humpti Dumpti. “Kiom da tagoj estas en jaro?”

“Tricent kaj sesdek kvin,” diris Alico.

“Kaj kiom da naskiĝtagoj vi ha-

vas?”

“Unu.”

“Kaj se vi deprenas unu el tricent sesdek kvin, kiom restas?”

“Tricent kaj sesdek kvar, kompreneble.”

Humpti Dumpti aspektis dubema. “Mi preferus vidi tion skribita sur papero,” li diris.

Alico ne povis ne rideti dum ŝi elprenis sian notlibron, kaj faris la kalkulon por li:

365

1

364

Humpti Dumpti prenis la libron kaj rigardis ĝin zorge. “Tio ŝajnas ĝuste farita — ” li komencis.

“Vi tenas ĝin renversita!” Alico interrompis.

“Vi plene pravas!” Humpti Dumpti diris gaje, dum ŝi turnis ĝin por li. “Mi kredis ke ĝi aspektas iom stranga. Kiel mi diris, tio ŝajnas ĝuste farita — kvankam mi ne havas sufiĉan tempon por plene ekzameni ĝin ĝuste nun — kaj tio indikas ke estas tricent kaj sesdek kvar tagoj dum kiuj vi povas ricevi nenaskiĝtagajn donacojn...”

“Certe,” diris Alico.

“Kaj nur unu por naskiĝtagaj donacoj, komprenu. Jen gloro por vi!”

“Mi ne komprenas kion vi celas per ‘gloro’,” Alico diris.

Humpti Dumpti ridetis malestime. “Kompreneble ne — ĝis mi informos vin. Mi celis diri ‘jen bela venka argumento por vi!’”

“Sed ‘gloro’ ne signifas ‘bela venka argumento’,” Alico objektis.

“Kiam mi uzas vorton,” Humpti Dumpti diris, per iom malestima tono, “ĝi signifas precize kion mi volas ke ĝi signifnu — nek pli nek malpli.”

“La demando estas,” diris Alico, “ĉu vi povas doni tiom da diferencaj signifoj al vorto.”

“La demando estas,” diris Humpti Dumpti, “kiu estu la mastro — jen ĉio.”

Alico estis tro perpleksa por diri ion; do post minuto Humpti Dumpti rekomencis. “Ili estas vantaj, kelkaj el ili — precipe verboj, ili estas la plej arogantaj — rilate al adjektivoj, oni povas fari kion ajn, sed ne verboj — tamen mi povas estri la tutan aron! Nepenetrebleco! Jen kion *mi* diras!”

“Bonvolu diri al mi,” diris Alico, “kion tio signifas?”

“Nun vi parolas kiel saĝa infano,” diris Humpti Dumpti, kiu aspektis tre plaĉita. “Per ‘nepenetrableco’ mi celis diri ke ni sufiĉe diskutis tiun temon, kaj ke estos plej bone ke vi menciui kion vi nun planas fari, ĉar mi supozas ke vi ne intencas resti ĉi tie dum via tuta cetera vivo.”

“Jen tre multe por la signifo de unu vorto,” Alico diris per pensema tono.

“Kiam mi devigas vorton laboregi tiel,” diris Humpti Dumpti, “mi ĉiam pagas al ĝi pli.”

“Ho!” diris Alico. Ŝi estis tro perpleksa por fari alian komenton.

“Ha, vi vidu ilin ĉirkaŭi min sabatonokte,” Humpti Dumpti pludiris, skuante sian kapon serioze flank-al-flanke, “por ricevi sian pagon, komprenu.”

(Alico ne aŭdacis demandi per kio li pagis ilin; do komprenu ke mi ne povas informi vin.)

“Vi ŝajnas tre lerta pri klarigo de vortoj, Sinjoro,” diris Alico. “Ĉu vi bonvolos diri al mi la signifon de la poemo nomita ‘Babilfrenzo’?”

“Mi aŭdu ĝin,” diris Humpti Dumpti. “Mi povas klarigi ĉiun poemon ĝis nun inventitan — kaj tre multajn

ankoraŭ ne inventitajn.”

Tio sonis esperiga, do Alico deklamis la unuan strofon:

*Rosge, dum la ŝliplaj tavoloj  
Tre gire en l’ ongefio borlis,  
Mizgilis ĉiuj borogovoj,  
Tenrefoj dejmaj gorlis.*

“Tio sufiĉas kiel komenco,” Humpti Dumpti interrompis: “estas multaj malfacilaj vortoj tie. ‘Rosge’ signifas la kvaran horon dum la postagmezo — la horo kiam oni komencas rosti manĝaĵojn por la ĉefmanĝo.”

“Tute bone,” diris Alico: “kaj ‘ŝliplaj’?”

“Nu, ‘ŝlipla’ signifas ‘supla kaj ŝlima’. ‘Supla’ estas sama kiel ‘aktiva’. Komprenu, ĝi estas kia valizo — du signifoj estas pakitaj en unu vorto.”

“Mi komprenas nun,” Alico komentis penseme: “kaj kio estas ‘tavo’?”

“Nu, ‘tavo’ iom similas al meloj — ili iom similas al lacertoj — kaj ili iom similas al korktiriloj.”



“Nepre ili estas tre kuriozaspektaj bestoj.”

“Ja vere,” diris Humpti Dumpti: “ankaŭ ili nestas sub sunhorloĝoj — ankaŭ ili manĝas fromaĝon.”

“Kaj kion signifas ‘gire’ kaj ‘borli’?”

“‘Giri’ signifas ĉirkaŭiri konstante, kiel gironkopo. ‘Borli’ estas fari truojn kiel borilo.”

“Kaj ‘l’ ongefio’ estas la herbo ĉirkaŭ sunhorloĝo, mi supozas?” diris Alico, surprizite pro sia propra genieco.

“Kompreneble. Oni nomas ĝin *‘longe’*, sciu, ĉar ĝi etendiĝas longe for antaŭ ĝi, kaj longe for malantaŭ ĝi —”

“Kaj longe for preter ĝi ĉiufanke,” aldonis Alico.

“Precize tiel. Nu, *‘mizgil’* signifas *‘mizera kaj fragila’* (jen ankoraŭ plia valizo por vi). Kaj *‘borogovo’* estas maldika ĉifonaspekta birdo kies plumoj elstaras ĉiufanke — iom simila al vivanta ŝvabrilo, per kiu oni lavas plankojn.”

“Kaj sekvas *‘Tenrefoj dejmaj’?*” diris Alico. “Mi kredas ke mi tre multe ĝenas vin.”

“Nu, *‘tenrefo’* estas ia verda porko: sed pri *‘dejma’* mi ne estas certa. Mi kredas ke ĝi estas mallongigo de *‘de hejmo’* — tio signifas ke ili perdis la vojon, komprenu.”

“Kaj kion signifas *‘gorli’?*”

“Nu, *‘gorlado’* estas io inter muĝado kaj fajfado, kun ia terno en la mezo: tamen, vi aŭdos ĝin, eble — en la tiea arbaro — kaj, unufoje aŭdinte ĝin, vi estos *tute* kontenta. Kiu deklamis tian malfacilan vortajon al vi?”

“Mi legis ĝin en libro,” diris Alico. “Sed *ja* deklamis al mi multe pli facilan poezion — Fingrumid, mi kredas.”

“Rilate al poezio, sciu,” diris Humpti Dumpti, etendante unu el siaj grandaj manoj, “*mi* povas deklami poezion egale bone kiel aliaj, se temas pri tio —”

“Ho, ne necesas temi pri tio!” Alico diris haste, esperante haltigi lin antaŭ ol li komencos.

“La poemo kiu mi deklamos,” li daŭrigis, sen atenti ŝian komenton, “mi verkis specife por distri vin.”

Alico opiniis ke tiukaze ŝi vere *de-  
vus* aŭskulti ĝin; do ŝi sidiĝis, kaj diris “Dankon” iom malfeliĉe.

*Dum vintro kiam kampoj blankas  
Por plezurigi vin mi kantas —*

“Kvankam mi ne kantas,” li aldonis, klarige.

“Mi vidas tion,” diris Alico.

“Se vi povas *vidi* ĉu aŭ ne mi kantas, viaj okuloj estas nekutime akraj,” Humpti Dumpti komentis severe. Alico silentis.

*Printempe, kiam arboj verdos,  
Signifon mian vi ne perdos.*

“Grandan dankon,” diris Alico.

*Somere, dum la longaj tagoj,  
Komprenos vi pri miaj agoj.  
Aŭtune, dum folioj brunas,  
La kanton skribu, ĉar vi junas.*

“Mi skribos, se mi ankoraŭ memoros ĝin,” diris Alico.

“Ne necesas fari pliajn komentojn tiajn,” Humpti Dumpti diris: “ili estas sensencaj, kaj ili ĝenas min.”

*Mi sendis al la fiŝoj diron:  
“Aŭskultu nun de mi deziron.”  
La etaj fiŝoj de la ondo  
Resendis vortojn de respondo.  
Respondis fiŝoj de la mar’:  
“Sinjoro, ni ne povas ĉar —”*

“Mi timas ke mi ne tute komprenas,” diris Alico.

“Estas pli facile en postaj partoj,” Humpti Dumpti respondis.

*Mi diris: “Ne utilas nei,  
Vi nepre devas min obei!”  
La fiŝoj diris kun rideto:  
“Kolera estas via peto.”*

*Mi diris jam, ripetis nun:  
“Suferos vi per mia pun’.”  
Sitelon grandan, novan mi  
Prenis por la venĝo ĉi:  
La koro mia batis “Tump!”  
Pleniĝis ujo per multpump’.*

Humpti Dumpti laŭtigis sian voĉon ĝis preskaŭ kriego dum li deklamis tiun strofon, kaj Alico pensis, tremante, “mi *neniel* volus esti tiu me-



saĝisto!”

*Li diris per fiera koro:*

*“Ne krii tiel, ho Sinjoro!”*

*Fierakore diris ke:*

*“Mi nepre vekus ilin se —”*

*Mi prenis korktirilon de*

*La breto, kaj mi iris re,*

*Ŝlositan pardon tamen gapis,*

*Mi tiris, puŝis, batis, frapis.*

*La pord’ rigidis ja sen ced’,*

*Mi l’ anson turni penis, sed —*

Sekvis longa paŭzo.

“Ĉu la poemo finiĝis?” Alico timide demandis.

“Ĝi finiĝis,” diris Humpti Dumpti. “Adiaŭ.”

Tio okazis iom subite, Alico pensis: sed post tia *tre* forta sugesto ke ŝi foriru, ŝi sentis ke apenaŭ estus ĝentile resti. Do ŝi stariĝis, kaj etendis sian manon. “Ĝis ni revidos unu la alian!” ŝi diris laŭeble gaje.

“Mi ne rekonus vin se ni ja rerenkontiĝus,” Humpti Dumpti diris per malkontenta tono, kaj li donis al ŝi unu fingron por manpremo; “vi estas precize simila al ĉiu alia homo.”

“Kutime oni distingas per la vizaĝo,” Alico komentis per pensema tono.

“Ĝuste pri tio mi plendas,” diris Humpti Dumpti. “Via vizaĝo estas sama kiel tiu de ĉiu alia homo — la du okuloj, tie—” (li markis ilian lokon en

la aero per sia dikfingro) “nazo en la mezo, buŝo sube. Ĉiam same. Nu, se vi havus ambaŭ okulojn ĉe la sama flanko de la nazo, ekzemple — aŭ la buŝon ĉe la supro — tio *iom* helpus.”

“La aspekto ne estus bela,” Alico objetis.

Sed Humpti Dumpti nur fermis siajn okulojn kaj diris “Decidu nur post provo.”

Alico atendis dum minuto por trovi ĉu li denove parolos, sed, ĉar li ne plu malfermis siajn okulojn nek plu atentis ŝin, ŝi ripetis “Adiaŭ” kaj, ne ricevinte respondon al tio, ŝi silente formarŝis: sed ŝi ne povis ne diri al si, dum ŝi marŝis, “El ĉiuj malkontentigaj—” (Ŝi ripetis tion laŭte, ĉar estis tre komfortige diri tian longon vorton), “el ĉiuj malkontentigaj homoj kiujn *iam* mi renkontis—” Ŝi neniam finis tiun frazon, ĉar tiumomente granda falbruo skuis la arbaron de unu fino ĝis la alia. □

## Trevor Steele ĉe UEA

UEA nomumis kiel sian Ĝeneralan Direktoron por la jaro 2002 nian membron Trevor Steele.

William Trevor Steele naskiĝis la 14-05-1940 en Mareeba, Aŭstralio. Li estas vaste konata kiel instruisto en pluraj landoj, kaj sukcesa verkisto. Li decidis akcepti la defion restarigi kunlaboran etoson en UEA kaj pli generale en la movado. Lia personeco kaj entuziasmo por la nova tasko estas sufiĉaj garantioj pri lia sukceso, pro kio la estraro formulas multajn bondezirojn kaj petas la esperantistojn, membrojn kaj nemembrojn, kunlabori kun li.

Li estos en Roterdamo kaj ekoficos la 1-an de januaro 2002. □



## Honoro al William Auld

La universitata biblioteko de Edinburgo (Skotlando) akceptis la privatan libraron de William Auld, la plej granda el la vivantaj Esperanto-verkistoj, kiu la 6an de novembro festis sian 77an naskiĝotagon.

La transdono estis faciligita de la fakto ke William Auld prezidas la Esperantan PEN-Centron, en tre bonaj rilatoj kun la Skota PEN (kies prezidinto, Paul Scott, subtenis la aliĝon de nia centro, kune kun la Slovena kaj la Svisitala delegitoj, en la mondkongreso en Santiago de Kampustelo, 10 septembro 1993).

Aldone, multe helpis la eĥo pri la kandidatiĝo de William Auld al la literatura Nobel-premio en aŭgusto 1998: la internacie plej vasta gazeta eĥo pri nia lingvo kaj ĝia kulturo dum la lastaj jaroj.

La privata biblioteko de Auld estas unu el la plej ampleksaj en Britio, probable la dua post "Montagu Butler" en Londono.

### Granda festo en Dolaro

William Auld donacis sian Esperanto-bibliotekon (librojn, presaĵojn, kolektojn ktp.) al la Nacia Biblioteko de Skotlando. D-ro Brian Hillyard, fakestro pri raraj libroj, akceptis oficiale la donacon dum malgranda ceremonio la 7an de decembro. D-ro Hillyard esperas ke en la daŭro de 2002 oni povos publikigi per Interreto la liston de la disponebla materialo.

Pli ol sesdek Esperantistoj kaj parencoj festis la donacinton en lia hejmo, en vilaĝo Dollar norde de Edinburgo. Per admirinda mastrumado

Meta, la eterne ĉarma edzino de Bill, kronis sian grandan sindediĉon al nia verkisto, kiu lastatempe trankvile konvaleskas post milda apopleksio.

La reteno de tiaj trezoroj ĉe publike alireblaj bibliotekoj en la landoj de la privata posedinto estas firma punkto en la raŭmisma kulturpolitiko, danke al kiu aliaj kolektoj estis jam savitaj: inter ili, tiuj de Roger Bernard (membro de LF-koop, kiu konvinkis lin testamenti favore al La Kvinpetalo) kaj de Gaston Waringhien, kies privatan bibliotekon Perla Martinelli (tiama ĉefredaktoro de LF) persone savis el la deportado alilanden, tiel ke ĝi restis en Francio, ankaŭ ĉe La Kvinpetalo.

[el Heroldo Komunikas]

---

## Sen Kontakto malfacilas kompreni la mondon

*Kontakto* estas la plej

- vaste legata junulara gazeto
- rekomendinda por komencantoj kaj instruistoj
- bela kaj modernstila
- diversa kaj amuza
- interesa por ĉiuj

En 2002 *Kontakto* aperos 6-foje. Abonu rekte ĉe UEA/TEJO aŭ ĉe viaj kotizperantoj. Provekzempleroj mendeblas en la Centra Oficejo de TEJO:

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA  
ORGANIZO  
Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam  
Nederlando

□

---

## Odlo Bokserp

*deziras informi ke pro sia ampleksa taskaro nuntempa, li devis diverĝi helpiston; li pardonpetas se la kompoziciado estas ĉinmere subnivela.*

## Nekrologo

*D-ro W. Dudley Parkinson*

W. Dudley Parkinson, nia bone amita prezidanto, forpasis el ĉi tiu vivo je vendredo la 12-an de Oktobro. Ni sentas mankegon kaj kondolencas al lia edzino D-ro Mary Parkinson kaj ŝia familio.

Li estis varilerta homo kaj multe scipova. Dudley naskiĝis en Okcidenta Aŭstralio en 1919. Lia patro estis ĉe la Observatorio Watheroo. Kiam juna li vojaĝadis ĉirkaŭmonde kun la patro, farante magnetakamp-esplorojn, lastatempe ĝis Observatorio Huancayo en Peruo. Ĉi tia scienca laboro kian li tiam faras eble gvidis lin al lia posta kariero kaj eble liaj ideoj pri la popoloj de aliaj landoj kaj iliaj lingvaj problemoj.

Dudley studadis ĉe gastlernejo en Sidnejo por sia formala eduko, kaj poste en la Universitato de Okcidentaŭstralio kie li gajnis BA-n kun honoro en Matematiko. Poste li iris al Observatorio Huancayo en Peruo dum mallonga tempo, kie li gajnis stipendion por studi kaj atingi doktorcon ĉe Universitato Johns Hopkins.

De tiam ĉio iris bone. Ĉi tie li renkontis kaj edziniĝis kun Mary, kiu estis Peruanino kaj ankaŭ studis ĉe la sama universitato. Poste li estis ĉe Universitato Fordham kaj tie li eltrovis la fenomenon de radioaktiva elfalo en Nevada post atombomba eksplodo, sed li ne povis publikigi la konkludojn.

Fine Dudley tiom forte sentas hejmsopiron al Aŭstalo ke ili (Dudley kaj Mary) decidis veni Aŭstralion. Tie Dudley eklaboris pri radiometraj kaj magnetaj esploroj ĉirkaŭ Aŭstralio kaj eĉ en Antarkto. Iom poste per eksperimentoj li eltrovis teknikon kiu

nun nomiĝas la *Parkinson Vector*.

Je 1967 Dudley moviĝis al la geologia fako de la Universitato de Tasmanio en Hobarto sub profesoro Sam Carey. Tie li faris pluajn eltrovojn pri teromagnetismo. Ĉe la Universitato li instruadis pri teroscienco kaj aŭtoris lernolibron pri tio.

Hobarto estis la lasta loĝloko, kaj kiam li rezignis sian taglaboron li turniĝis al aliaj intereso, kaj frekventis kunvenon de La Societo de Amikoj, kie iufoje oni informis lin pri Esperanto. Li tre interesiĝis kaj eklernis ĝin. Lerninte la lingvon li iniciatis lecionojn por kelke da gelernantoj proksimume je 1992. Baldaŭ poste li revivigis la Hobartan Esperanto-Klubon.

Dudley dum la sekvaj jaroj ĉeestis kelke da somerkursaroj kaj kun sia edzino la Universalan Kongreson en Seoul en 1994. Alia interesiĝo de Dudley estis la muziko. Li estis ano de la Tasmania Simfonia Orkestro, ludante klarineton, kaj li havis fundamentan scion de la muziko.

Ni bedaŭras la perdon de talenta homo kaj bona Esperantisto.

[Verkis Eric Bantick] ☐



**POR RIDIGI  
VIN**



Li : Ĉu vi amas min ?

Ŝi : Jes!

Li : Do, diru tiel.

Ŝi : Tiel!

Scienculo iam emis trinki grandan gluton da inko el sia inkujo. Feliĉe li havis tamen sufiĉe da inteligento por tuj engluti du foliojn da inksorbilo. [El Ĉaŭ (lingve reviziita)]



## Skribas la Legantoj



**Mi estas 51-jaraĝa** instruisto loĝanta en Lublino (en Pollando). Mi laboras kiel instruisto en lernejo por gejunuloj kun intelekta deficiito.

En la lernejo mi okupiĝas pri gimnastiko kaj masaĝo, Ĉi jare mi ricevis la *Certificate of Completion in Educational Kinesiology Paul E Denison*. Tiun ĉi terapeŭtikan metodon mi ankaŭ uzas laborante.

Dum someraj ferioj mi marvojaĝas tra la maro. Mi havas la diplomon de jaĥta kapitano kaj trejnisto de velado. Mi ne estas proprieto de jaĥto, tial mi volonte komencus korepondadon kun personoj havantaj la saman hobion por ke ni povu kune velnavigadi. Mi ne estas fumanto nek drinkanto .

Mi estos treege dankema al vi pro helpo kaj kompreno de mia peto.

Wieslaw Michalak

<monivies@poczta.onet.pl>

**Mi tre ĝoje legis** pri via adreso en "VerdaReto". Mi ne scias, ĉu mi eble estos via plumamiko? Mi esperas, ke ni ambaŭ estos bonaj amikoj. Ĉu vi estas esperantist(in)o? Inter ni, ĉu eble interŝanĝos multajn materialojn pri tiuj temoj? Mi ne scias, kion vi volas ricevi? Vi eble skribos pri via bezonado al mi. Se mi povos plenumi do mi certe plenumos al vi.

Mi estas instruisto de Geografio kaj Historio. Mi instruas la Geografion kaj la Historion al miaj gelerntoj. Mi tre volas scii, kio estas via profesio? Kie vi laboras? Kia estas via aĝo? Prezentu al mi viajn famil-

ianojn, mi petas. Ĉu bone? Dankon!

Mi havas familion malgrandan, sed tre feliĉan. Mi kaj mia ezdzino en la familio. Ankoraŭ du miaj filoj, La unua filo estas oficiro en armeo. Li jam edziĝis. La dua filo nun estas studento en universtato. Mi ofte ellitiĝas frue, kutime je 30 minutoj post la 4-a. Mi tre amas geografion kaj historion, ankaŭ tre amas mapojn kaj atlasojn. Je la 7a mi iras labori. Mi komencas je 50 minutoj post la 7-a. Mi finas laboron je 30 minutoj post la 4-a posttagmeze. Jes, post vespermanĝo mi kutime legas mapojn kaj atlasojn, kelkofte spektas TV. Mi enlitiĝas je la 9-a.

Mi tre ŝatas legi la mapojn pri diversaj landoj. Mi jam havas amikojn en Danlando, Germanio, Nederlando, Rusio, Brazilo ktp. Ili jam sendis mapojn kaj atlasojn pri Danlando, Orienta Germanio, Nederlando. Ĉu vi eble sendos mapojn kaj atlasojn pri via lando aŭ regiono al mi? Dankon!

Pri mapoj kaj atlasoj, kiu ajn lingvo tute eble, ĉar mi ĉiujn povas legi. Ĉar mi pli ŝatas kolekti diversajn landajn mapojn kaj diversajn regionajn mapojn, ankaŭ atlasojn. Ĉu ni eble interŝanĝos? Dankon!

Mi atendas vian respondon!

Mia adreso:

Sinjoro Zhao Yingwen Dangxiao

Gui-Hua-Jie 204,

Distrikto Su-Jia-Tun de Ŝenyang  
110101,

Liaoning-a Provinco,

Ĉinio





## Recenzas via redaktoro



**Marko Polo:** *La libro de la mirindaĵoj aŭ La priskribo de la mondo.* Tr. Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p., ilustrita, broŝ. Serio ORIENTO-OKCIDENTO #34.

Takso: 🍷🍷🍷🍷🍷.

Marko Polo vivis 1255-1324, kaj estas la plej bone konata mondesploristo de la malfrua mezepoko. Lia libro konsistas el detaloj pri liaj veturoj al Azio (inkl. Indonezian), kun priskriboj de la kulturoj, kutimoj, landoj, urboj, kaj produktaĵoj kiujn li tie trovis, plus multaj historiaj faktoj kaj legendoj. La libron li diktis al sia amiko Rusticello, kiu ankaŭ redaktis kaj kelkfoje komentis la verkon. Ĉu Marko Polo diktis en la Franca lingvo, aŭ ĉu Rusticello tradukis la italan lingvaĵon de Marko Polo al la Franca, estas nesciate. Sed nur Franclingva originalo nun ekzistas.

Ĉi tiu traduko en Esperanton estas tre ĝuplene legebla. La traduko estas klara, enestas multaj klarigoj pri nekutimaj vortoj kaj esprimoj, kaj sufiĉe spegulas la stilon de la originala verko por doni mezepokan senton sen perpleksigi la leganton. Do modele farita traduko.

Oni povas legi la verkon de Marko Polo senĝene; se oni tamen deziras klerajn notojn pri li, liaj raportoj, la loknomoj, kc., Daniel Moirand donas ilin abunde en tre granda nombro da piednotoj. Krome, en tiuj piednotoj, Moirand diskutas la kredoblecon de la diversaj raportoj, tiel ke la Esperanta versio estas klera kontribuo al la historiaj studoj.

Marko Polo estis ordinara siatempulo, iom tro kredema (li raportas evi-

dentajn legendojn kiel historiajn faktojn), religie romkatolika — li dividas la religiojn de la mondo en tri kategoriojn: kristanismo, la “sacracenoj” [evidente Islamanoj, kiujn Moirand nomas “muzulmanoj”] kiuj laŭ li estas teruraj herezuloj, kaj la “Idolanoj” [kiuj evidente estas la Budhistoj, laŭ liaj detalaj priskriboj]. Li altetaksas Budhismon, kvankam li insistas ke ili adoras idolo(j)n; li komentas ke la instruoj de la Budho estis tiel altkvalitaj ke se li estus baptita, li rajtus rangi kiel profeto apud Jesuo Kristo mem.



Marko Polo  
laŭ mozaiko en Ĝenovo

La leganton interesas trovi kiajn ĉiutagaĵojn nuntempajn Marko Polo tute ne konis en la okcidento. Ekz., pri la Ĉinoj li miras ke ili bruligas ian ŝtonspecon, anstataŭ lignon = karbon; ke ili faras paperon el lignaĵoj anstataŭ katuno, kaj uzas surstampitajn paperajn biletojn kiel monon anstataŭ metalajn monerojn.

Ĝenerale, li trovas la Ĉinan civilizacion multrilate admirinda. Tamen li restas okcidentulo, Italo, kaj ĉion juĝas laŭ komparo kun Eŭropaĵoj.

Moirand atentigas ke multo en la libro estas tre teda, kaj li pravus. Sed min plezurigis trovi kiom da paĝoj estas neniel tedaj. La nuntempa leganto povas tre ĝui sian legadon, kaj kvankam tre ofte necesas transsalti batalraportojn ktp., inter tiuj raportoj estas multo interesa.

Marko Polo, aŭ eble lia redaktoro Rusticello, emas uzi ŝablonajn frazojn por karakterizi regnojn, homojn, kaj urbojn, precipe kiam li ne mem persone renkontis ilin. Tamen...

Kritikoj: nu, la libro, kvankam ampleksa kaj bone presita kaj tre konservinda, estas aĉe glubindita, kaj la paĝoj komencas elfali tre facile. Kial la eldoninto ne donis taŭgan bindon al ĉi tiu tre grava (kaj multekosta...) libro?

La ilustraĵoj estas interesaj kaj mezepokecaj. Sed mi ne rimarkis informon pri la origino de la ilustraĵoj, kaj ne trovis liston de ili.

Kvankam la libro estis zorge korektita, restas diversaj komposteraroj; kaj troveblas diversaj lingvaj penseraroj de la tradukinto<sup>1</sup>, kiuj ne tre ĝenas la leganton, ĉar ili estas nemultaj, sed kiujn trovi en tiel klera eldono estas nedezirinde.

Ensume: mi varme rekomendas ĉi tiun libron. □

**Harry Harrison:** *La kaptita universo*. Tr. Andre Grigorjevskij. Moskvo: Impeto, 2001. 173p., broŝ.

Takso: 🍷🍷🍷🍷.

Mi ĝuis ĉi tiun romanon, kiu estas de

bone konata sciencfikciverkisto.

En valo, el kiu ne eblas iri, troviĝas Azteka civilizacio. La heroo de la romano estas 21-jara knabo, kiu estas bone konata de la pastroj pro sia ribelemo. Pro malobeo al la sanktaj ordonoj, li trovas neceson fuĝi el la valo. Sed kiel? Kaj kio troviĝas preter la montlimoj de la valo?

Interese verkita romano, bone konstruita kaj bone tradukita el la Angla lingvo. Neniel "alta literaturo", sed tre distra. Bone presita, leginda. □

**Tivadar Soros:** *Maskerado ĉirkaŭ la morto*. Red. kun komentario de Humphrey Tonkin. (Reviziita, 2a eldono.) Rotterdam: UEA, 2001. 318p., ilustrita, glue broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷🍷.

La unua eldono de ĉi tiu originala Esperanta aŭtobiografia verko estis eldonita de Stafeto en 1964. Ĉi tiun kleran reeldonon preparis Humphrey Tonkin, bone konata Esperantisto, kiu konsultis pri detaloj kun Paul kaj George, la du filoj de Tivadar. Tivadar mem mortis en 1968.

Temas pri detala priskribo de la spertoj en Hungario dum la dekunumonata periodo marto 1944-februaro 1945. Soros estis juda advokato en Budapeŝto, kie li loĝis kun sia edzino kaj du filoj.

En marto 1944 la nazioj invadis Hungarion kaj starigis nazian registaron tie. Eichmann tuj venis al tiu urbo por komenci la ekzekutadon de la multmil judoj en Hungario. Ĉar jam la Aliancaj nacioj komencis sukcesi en sia kontraŭatako kontraŭ Germanio, ŝajnas ke la hitleristoj sentis ke necesas kiel eble plej rapidigi la plenan ekstermon de la judoj.

Ĉar Soros estis bone edukita, altklasa persono kun bona kompreno pri kio okazas en Eŭropo, li tuj vidis la

<sup>1</sup> Ekz. "li ripozas sin", kaj aliaj verberaroj similaj; tre sporadaj/maloftaj akuzativeraroj; kaj kelkaj vortmisuzoj.

neceson kaŝi ne nur sin mem sed tiom da Budapeŝtaj (kaj ankaŭ eksterbudapeŝtaj) judoj kiom eblis.

Dum la unuaj monatoj tio estis relative simpla, ĉar dokumentofalsistoj ankoraŭ praktikadis sian metion en Hungario, kaj povis provizi tre bonajn (kvankam ne ĉiam perfektajn) falsitajn identeco-dokumentojn, tiel ke multaj judoj fariĝis ŝajnoficiale kristanoj, do ne ekzekutotaj.

Multaj hungaroj akceptis loĝigi la kaŝjudojn. Tamen, dum pasis la monatoj, la sagokrucanoj (t.e. Hungaraj nazioj) pli kaj pli malfaciligis la sinkaŝon de judoj, kaj fine komencis murdi ankaŭ tiujn kristanojn kiuj helpis aŭ kaŝis ilin; kaj, lastamamente, eĉ perforte eniris konsulejojn de aliaj landoj, kie rifuĝis judoj. Ankaŭ monaĥinejojn kristanajn ili perforte eniris por eltiri judojn protektatajn de la monaĥinoj en ili.

Egale granda problemo estis la emo de tre multaj Hungaraj judoj ne kredi ke la nazia minaco estas tiom sincera kaj plenumota. Multaj akceptis surporti la flavan stelon, kiu identigis judon kaj laŭ nazia leĝo devis esti videbla sur la vestoj de ĉiu judo. Tiel la sagokruca murdistaro povis tre facile ilin trovi kaj neniiĝi. Ju pli la Aliancaj armeoj proksimiĝis al Germanio, des pli fanatike kaj des pli malkaŝe la nazioj kaj naziemuloj murdadis, publike kaj tre videble.

Tamen, *Maskerado ĉirkaŭ la morto*<sup>1</sup> ne estas detala raportado pri la murdado, sed plejparte detala raportado pri la streboj de la familio Soros kaŝi sin de la sagokrucanoj — ili tre sukcesis pri tio. La deziro vivi estas multe pli forta ol la deziro sin identigi kiel religiano; krome, kvankam judoj,

la familio Soros ne estis religema, kaj ne observis la ritajn regulojn familiarajn inter ortodoksaj judoj.

Estas necerte kiom da Hungaraj judoj pereis per la agado de la sagokrucanoj; nek kiom sukcesis kaŝi sin pretendante esti kristanoj. Ĉiukaze, ambaŭ nombroj estis relative grandaj.

Soros, kiu estis unu el la fondintoj de la fama veuo Esperanta *Literatura mondo*, ne estis mem literature lerta; lia stilo en *Maskerado* (multe korektita, unue de Kalocsay kaj Juan Régulo Pérez; kaj, por ĉi tiu eldono, ankaŭ de Humphrey Tonkin) estas facile legebla, sed ne eleganta, kaj plena de Anglismoj.<sup>2</sup> Sendube pro tio Aŭstraliaj Esperantistoj facile komprenos ĝin — kaj sentos la influon de ne tre imitindaj stilaj misaĵoj.

Fizike: la papero uzita por la libro estas ne bonkvalita; kaj la glua bindo estas same nefortika kiel tiu uzita por la libro de Marko Polo. Estas neklare kial UEA decidis elspezi multan monon por eldoni tiujn du tre valorajn nefikciajn verkojn, tamen ne volis elspezi sufiĉon por certigi bonkvalitan paperon aŭ bindon kiu plu kuntenos la paĝojn post pli ol nur unu aŭ du legoj. Estas neverŝajne ke la ekzempleroj aĉetitaj de vi ĉijare, ankoraŭ post kvin jaroj estos uzeblaj...

Ĉu aŭ ne vin interesas legi la historiajn detalojn pri la eventoj en Eŭropo en 1944-1945, tamen mi rekomendas ke vi legu ĉi tiun libron, por pli bone koni la homan animon. Kaj por informiĝi unuamane pri la fiaj agoj farataj dum militado. □

<sup>1</sup> "Maskerado" ĉi tie signifas "kredigi ke oni estas kristano, por trompi la naziojn".

<sup>2</sup> Ekzemple: "al ili du" = "to them both"; kaj stranga uzo de la vorto *kiu* en frazoj kiaj "la sepa distrikto, kiu regiono jam antaŭe estis dense loĝata" = "the seventh district, which region was already heavily populated".



**Annirudha Banhatti:** *Aniruddha Rakontas*. 90-minuta sonbendo. Eld. de la rakontinto. Mendebila ĉe la adreso: b-2. Kanchan Nagari, Katraj, Pune 411046, Hindio. Prezo:US\$8.00. inkl. la sendokostojn.

Takso: 🍷🍷🍷.

Sur flanko A de la bendo estas la rakonto “La lotus-manganto” de W.S. Maugham. Sur flanko B estas “Fajna, malnovmoda rakonto” de W. Saroyan, plus “Intervjuo kun S-ro Ĉakko”.

La rakontoj estas, kompreneble, tradukitaj en Esperanton; ilin voĉlegas Aniruddha Banhatti, kiu verkis la novelon “La sekreto de Ŝam” publikigitan en *ĈX* 9/4 (Julio-Aŭgusto 2001). La aŭtoroj estas inter la plej famaj Anglalingvaj verkistoj de la pasinta jarcento, do la kvalito de la rakontoj mem estas alta.

La voĉo de Aniruddha Banhatti estas forta vira voĉo, klara kaj facile aŭdebla. Lia prononco estas ĝenerale bona — nur kelkfoje mi rimarkis misprononcojn, verŝajne ŝulditajn al la fakto ke li legas naŭdek minutojn da materialo, do laciĝis kelkfoje. Min iom ĝenis lia tre malofte, kelkfoje apenaŭ aŭdebla, prononco de la literoj ĝ kaj ĵ, kvazaŭ li trovas tiujn sonojn iomete malfacilaj, tiel ke li fojfoje cedas al la tento murmuri tre

malalte la sonon ŝ anstataŭe. Li ĝenerale ne sukcesas prononci *kv* (kiel en la vorto “kvar”), sed anstataŭe prononcas *kŭ*. Kelkfoje li misakcentas, precipe vortojn finiĝantajn per *-io*, sed verŝajne temas pri voĉa laceco.

Multe pli grava estas la preskaŭ-monotona, kaj ofte tre stakata maniero legi, pro kiu la tekstoj perdas grandan parton de sia ĉarmo, kaj nepre de sia ekscito.

Tamen, la legado estas klara, kaj progresinto en Esperanto povas senĝene sekvi la vortojn; sed estus pli bone se Annirudha Banhatti kunsendus la tekstojn de la leĝaĵoj, tiel ke ankaŭ la ne-ege-lertaj aŭskultantoj ankaŭ povu sekvi la vortojn kaj ĝui la enhavon. □



POR RIDIGI  
VIN



Sidis tri patrinoj fanfaronante pri siaj perfektaj filinoj.

“Neniam troviĝis filino pli perfekta ol mia Alico,” diris s-ino Jones. “Ĉiun someron ŝi veturigas min al Kvin-slando unu tutan semajnon, kaj ĉiun vintron ni pasigas unu tutan semajnon kune en Viktorio.”

“Tio estas nenio kompare kun tio, kion faras mia Anna por mi,” fiere diris s-ino Taggart. “Ĉiun vintron ŝi pagas por mi du semajnojn en Svisujo, kaj dum la somero du semajnojn en belega Perto, en sia privata domo.”

S-ino Palmer nur ridetis. “Neniu amas sian patrinnon kiel mia Jackie. Neniu!”

“Kion ŝi do faras?” demandis s-inoj Jones kaj Taggart.

“Tri fojojn ĉiusemajne ŝi eniras tak-sion, iras al la plej multekosta psikiatro en la urbo, pagas al li ĉiuhore \$150 — nur por paroli pri mi!”

[El *Tamen Plu*]

## Inversigita mondo

### Recenzas Garbhan Macaoidh

**Lewis Carroll:** *Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie*. El la Angla tradukis Donald Broadribb. Kun ilustraĵoj de John Tenniel. Jekatarinburg: Sezonoj, 2001. 128 paĝoj glue binditaj.

Oni rakontas ke, kiam la Angla reĝino Viktoria legis la du infanrakontojn pri Alico de Lewis Carroll, ŝi estis tiom ravita ke ŝi ordonis ke la aŭtoro havigu al ŝi ĉiujn ceterajn librojn kiujn li verkis. Ŝi, tamen, rapide senluziĝis, kiam al la palaco estis liverita granda pako da pezaj (en du sencoj) volumoj pri matematiko. Ŝia Reĝina Moŝto ne sciis ke Lewis Carroll estis pseŭdonimo de Charles Lutwidge Dodgson (1832-1898), lektoro pri matematiko en la universitato de Oksfordo.

La du infanlibroj kiuj tiom ĉarmis la reĝinon estis *Alico*<sup>1</sup> en *Mirlando* (1865) kaj *Trans la spegulo* (1871). Ekde tiam, pluraj generacioj da infanoj kaj certe ne malmultaj plenkreskuloj ĝuis la fantastajn aventurojn de Alico. Ĝis hodiaŭ tiuj rakontoj restas popularaj, kaj estas haveblaj versioj en pluraj lingvoj.

La enciklopedia vortaro *Oxford Reference Dictionary* priskribas Dodgson, alinome Carroll, kiel aŭtoron de “malnaivaj infanklasikaĵoj” (sophisticated children’s classics). La (en ĉi tiu kunteksto) nekutima adjektivo “malnaiva”, kredeble, aludas al la fakto, ke, kvankam la enhavo de tiuj libroj unuavide ŝajnas simplaj (!) enlitig-

horaj rakontoj por junaj infanoj, la samaj infanoj, proksimiĝante al adolteco, konstatos ke en la rakontoj estas pli da substanco kaj subtileco ol ili supozis.

Sendube, Dodgson ne estis tipa reprezentanto de la iom sufoka kaj pedanta 19-jarcenta akademia medio, kaj la “Alic-”libroj estas unikaj inter la infanliteraturo de tiu epoko. Ĝis tiam, legaĵo por infanoj konsistis preskaŭ ekskluzive el moraligaj tekstoj, celantaj ensemi konvenciajn virtojn kaj religion en junajn mensojn. Kontraste, Dodgson/Carroll ludas per kaj ŝercas pri respektataj fakoj, instancoj kaj valoroj: logiko, aritmetiko, poezio, pompo kaj — (hororo!) la lingvo de la Brita Imperio. Li amuzis sin kaj siajn legantojn, montrante la mankon de logiko en normala lingvaĵo. Jen ekzemplo sur la paĝo 73:

Alico: “Mi vidas nenium sur la vojo”.

Blanka Reĝo: “Se nur mi havus tiel akrajn okulojn! — Povi vidi Neniun! Kaj je tioma distanco! Ho! *mi* apenaŭ povas vidi realajn homojn en ĉi tiu lumo!”.

En ambaŭ rakontoj, Carroll inkludas parodiojn de popularaj kantoj por infanoj kaj de moraligaj poemoj. Plie, diversaj roluloj recitas specimenojn de io, kion la angloj nomas *nonsense verse* (“sensencaj versaĵoj”).

Dodgson verkis la du librojn por iu vera Alico, nome Alice Liddell, malgranda filino de la dekanato de sia kolegio en Oksfordo. (Parenteze, ie mi legis, ke ankoraŭ ekzistas foto de Alice Liddell farita de Dodgson mem, kiu estis entuziasma fotografisto.) En

<sup>1</sup> Strange ke oni ankoraŭ uzas la formon “Alico”, kvankam la hodiaŭa Esperanto ĉesis sekvi la Zamenhofan praktikon apliki la substantivan finaĵon -o al virinaj nomoj, kaj preferas uzi la adjektivan finaĵon -a.



ambaŭ rakontoj, Alico dumsonĝe eniras (per kuniklotruo en la unua, kaj trans spegulo en la dua) fantastan mondon, en kiu bestoj parolas, ludiloj (respektive, ludkartoj kaj ŝakfiguroj) iĝas homoj, kaj kie ŝi havas bizarajn aventurojn.

La spegulo — tiu mirinda kaj mistera inventaĵo, kiu ĉion inversigas — estas temo de multaj fabeloj, kaj hodiaŭ ĝi estas objekto de sciencaj studoj kaj disertacioj. Ĝi instigas ankaŭ spekulativajn teoriojn pri “alternativaj universoj”.

Junaj infanoj al kiuj oni legas *Trans la spegulo* eble ne tuj rimarkos ke, krom esti rakonto, ĝi estas ankaŭ ŝakludo. Ĉiu aventuro de Alico estas movo sur ŝaktabulo. Tio estas klarigita sur la dua paĝo post la titolpaĝo. Iom konfuze, tamen, la paĝnumeroj indikitaj sub la ŝaktabula ilustraĵo ne korespondas al tiuj en ĉi tiu esperanta versio.

Certe, iu ajn kiu intencas traduki la Alic-librojn alfrontas nefacilan taskon. La humuro estas tre Angleca (kelkfoje iom lama), kaj la “sensencaj versoj” prezentas apartan problemon. Pro tio, estas interese ke diversaj tradukantoj jam plurfoje provis “pseŭdoesperantigi” la “pseŭdoanglan” de Lewis Carroll. Mi konas almenaŭ du aliajn versiojn, krom tiu de la versaĵo *Babilfrenezo* (*Jabberwocky* en la Angla originalo), inkludita en *Trans la spegulo* (paĝo 17): unu sur la paĝo 113 de *Angla Antologio 1800-1960*, kaj alian en n-ro 12/1989 de la bulteno *Irlandafrika esperantisto*.

Ĝenerale, mi trovis la tradukon de Broadribb sufiĉe kontentiga. Estus malĝuste kompari ĝin kun la majstra traduko de William Auld de la libroj de Tolkien, en kiu la simile multnombraj versaĵoj estas preskaŭ ekzaktaj

respegulaĵoj de la originaloj. Tamen, kelkaj strofoj de iuj versaĵoj en *Trans la spegulo* estas iom fuŝaj kaj nepronceblaj, ekzemple, “Kiel akv’ tra tribil’ vibras”. La ŝercoj en la teksto ne ĉiam sukcesas, sed kredeble tio ne estas kulpo de la tradukinto.

Iom strange en infanlibro estas la ĉeesto de piednotoj. Eble kelkaj estas bezonataj, ekzemple, por klarigi la laŭvortan tradukon de Anglaj nomoj de insektoj (la diversaj “-muŝoj”), sed ŝajnas iom pedante indiki la Latinan botanikan terminon *Brassica chinensis*.

Laŭ mi, la dua libro pri la aventuroj de Alico estas iom malpli interesa ol la unua. Ĝi pli konsistas el dialogoj kaj versoj ol aventuroj kaj agoj, kaj la karakteroj estas malpli abundaj kaj allogaj. Tamen mi ŝatis la Blankan Kavaliron, kiu memorigas min pri Donkiĥoto — eĉ lia bildo iom similas la famajn ilustraĵojn de Gustavo Doré en la ĉefverko de Cervantes. Cetere, estas ĝojige ke ĉi tiu Esperanta versio inkludas belajn ilustraĵojn de John Tenniel kiuj aperis en la unua Angla originalo.

Malgraŭ mia prefero por *Alico en Mirlando*, ĉi tiu sekvaĵo estis tre populara en Anglio kaj eĉ influis la Anglan lingvon. Inventaĵo de Lewis Carroll estas komuna esprimo *portmanteau word*, “valiza vorto” (“Komprenu, ĝi estas kia valizo — du signifoj estas pakitaj en unu vorto” — klarigo de Humpti Dumpti), kaj kelkaj “valizaj vortoj” eniris la normalan Anglan vortaron, ekzemple *chortle* (vidu uzon de *ĉortlis* sur la paĝo 19). *Chortle* estas kombinaĵo de du verboj: *chuckle* (subridi) kaj *snort* (ronki), kaj signifas laŭtan ĝojan ridegon.

Laŭ piednoto, la epizodo *Vespo en*

peruko estis eligita el la libro antaŭ la publikigo de la originala Angla eldono de 1871. Oni povas diveni la kialon, ĉar ĝi aldonas nenion al la rakonto, krom unu malgrava versaĵo.

Mi rimarkis nur unu negravan komposteraron, nome “Maksaro” anstataŭ “Makasaro” en piednoto sur la paĝo 91.

[Recenzo disvastigita per Interreto de FEL, kaj aperonta en *Monato*].<sup>1</sup> □



## POR RIDIGI VIN



### La pordoj de la ĉielo

Viro kaj lia hundo marŝis laŭ la vojo. La viro ĝuis la vidindaĵojn, sed subite li konsciis ke li estas mortinta. Li memoris ke lia hundo mortis antaŭ multaj jaroj.

Iom poste ili alvenis al alta blanka ŝtona muro ĉe unu flanko de la vojo. Ĝi aspektis kiel altkvalita marmoro. Supre de longa monteto ĝi estis interrompita de alta arkopasejo, kiu lumetis en la sunlumo. Starante antaŭ ĝi li rimarkis rimarkindan pardonon en la arkopasejo. Ĝi aspektis kiel perlamoto, kaj la trotuaro kondukanta al la pordo aspektis kiel pura oro.

Li kun sia hundo alproksimiĝis al la pordo. Tie ili vidis viron sidantan ĉe skribotablo ĉe unu flanko.

Diris la hundoposedanto: “Pardonu min, kie ni estas?”

“Tiu ĉi estas la ĉielo, sinjoro,” respondis la alia.

“Ĉu vere? Ĉu eble vi havas iom da akvo?” petis la ĵusalveninto.

“Kompreneble, sinjoro. Eniru, kaj mi tuj portigos iom da malvarma akvo,” estis la respondo. Li gestis, kaj la pordo ekmalfermiĝis.

Montrante al sia hundo la viro

demandis, “Ĉu ankaŭ mia amiko rajtas eniri?”

“Mi bedaŭras ke ne, sinjoro, ni ne akceptas dombestojn.”

Pensis la viro unu momenton, tiam li turnis sin al la vojo, kaj li kun sia hundo daŭrigis la iradon.

Post longega marŝo, kaj sur la supro de alia longa monteto, ili atingis gruzan vojkondukantan al bona pordo. La pordo aspektis kvazaŭ ĝi neniam estas fermita. Estis neniu barilo. Alirante al la pordo li rimarkis ke viro sin apogas al arbo dum li legas libron.

“Saluton”, li alvokis la leganton. “Ĉu troviĝas iom da akvo ĉi tie?”

“Jes, certe,” respondis la alia. “Jen akvopumpilo,” li montris al malnova pumpilo. “Bonvolu eniri!”

Demandis la vojaĝanto, “Kaj mia amiko, ĉu ankaŭ li?” li montris al la hundo.

“Estas bovlo apud la pumpilo, se mi bone memoras,” respondis la bonulo.

Eniris la paro tra la pordo, kaj trovis malmodernan permanen funkciigeblan pumpilon kun apuda bovlo. Trinkis profunde la viro, plenigis la bovlon per akvo kaj donis ĝin al la hundo. Trinkinte ĝissate ili aliris al la bonkorulo, kiu ilin atendis apud la arbo.

“Kio nomiĝas ĉi tiu loko?” demandis la vojaĝanto.

“La Ĉielo”, ridetante respondis la bonkorulo.

“Nun mi estas tute konfuzita”, diris la vojaĝanto. La viro ĉe la alia pordo informis min ke lia estas la Ĉielo...”

“Ho, vi aludas al la loko kun la ora trotuaro kaj perlamotaj pordoj, ĉu ne? Ne, tiu loko estas la Infero!”

Paŭzis iomete antaŭ ol respondi la vojaĝanto. “Sed ĉu ne kolerigas vin ke li uzas vian loknomon tiel?”

“Tute ne. Ni estas nur tre dankaj al li, ke li forkribras tiujn kiuj pretas forlasi siajn plej bonajn amikojn!”

[El *Tamen Plu*] □

<sup>1</sup> La eldonejo Sezonoj informas ke ĝi planas aperigi en unu volumo ambaŭ verkojn *Alice en Mirlando* kaj *Trans la spegulo kaj kion Alice trovis tie*, “post kelkaj jaroj”, kun novaj reproduktaj de la ilustraĵoj desegnitaj de Teniel por *Alice en Mirlando*. — [E]



## POR RIDIGI VIN



### Kiel instali programon — dekdupaŝaj instrukcioj de Dave Barry<sup>1</sup>

Kontrolu la skatolon de la programo, ĝis vi trovos glumarkon aŭ presaĵon kiu klarigas la specon de komputilo kiun vi bezonas por lanĉi la programon. Ĝi estas io tia:

#### POSTULOJ POR LA SISTEMO

procezilo 2386 aŭ supera  
modemo je 628.4 megabitoj ĉiu-  
sekunde

719.7 MB da libera spaco en la dis-  
ko

3546 MB da RAM-memoro

Tio antaŭsignifas ke la programo ne funkcios en via komputilo.

Malfermu la skatolon kaj prenu la manlibron. Ĝi enhavas detalajn instrukciojn por la instalado, uzado kaj solvo de problemoj. Kiel kutime, forĵetu ĝin en la plej proksiman rubujon.

Trovu la programon kiu troviĝas en la 3½-cola disketo aŭ kodoromo, ene de koverto sur kiu legiĝas:

#### KONTRAKTO PRI LICENCO

Malferminte tiun ĉi koverton, la uzanto (de nun nomata “Uzanto”) konsentas ke li/ŝi akceptos ĉiujn regulojn kaj kondiĉojn starigitajn de la ĉeestanta kontrakto, kondiĉojn kiujn neniu legas, same kiel neniu legas la Ĝenevan Konvencion, la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj aŭ la Statuton de UEA. Li/ŝi same konsente solidaras al aliaj reguloj kaj kondiĉoj, realaj, imagitaj aŭ imagotaj, kiujn la produktinta Entreprenejo (de nun nomata “Entre-

preno” eventuale konsideros necesaj kaj taŭgaj, inkluzive de la rajto iri al la hejmo de la Uzanto por kontroli la enhavon de ties malmola disko, disketujo, tirkesto da subvestoj, ĝis la bela sonĝo de l’ homaro por eterna ben’ efektiviĝos ktp...

Liveru la programon al infano inter 3 kaj 12 jarojn aĝa kaj diru (nomo de la infano), bonvolu instali tiun ĉi programon en mian komputilon.

Se vi ne havas gefilojn en tiu aĝo, enmetu la programon en la taŭgan legilon, tajpu **INSTALU** kaj premu la klavon **ENTER**. Unue ŝaltu la komputilon, evidente. Refoje do: tajpu **INSTALU** kaj premu la klavon **ENTER**.

Vi aŭdos knaradon kaj grincojn dum kelkaj minutoj. Post tio sur la ekrano aperos:

La instalprogramo nun kontrolos vian sistemon por trovi la plej bonan manieron igi ĝin senefika. Ĉu vi konsentas?

Elektu unu el la eblecoj, kaj estu honesta: **JES/EVIDENTE**.

Post la elekto, vi refoje aŭdos grincojn dum longa tempo, kiam nur-Dioscias kion oni faras al via komputilo.

Finfine la instalprogramo kreas multajn dosierujojn, subdosierujojn, subsubdosierujojn en via malmola disko, plenigitajn de miloj da misteraj dosieroj kun nomoj kiaj “rostbefo.exe”, “kaserolo.dat” kaj “fazeolo.dll”.

Kiam finiĝos la instalado, sur via ekrano aperos:

**GRATULON!**

La instalprogramo ne plu povas elpensi ion por ĝeni en via komputilo kaj rezignas. Vi nun povas lanĉi la programon. Se vi trovos iun problemon, elektroŝokon, maldormemon, mankon de spiro aŭ stomakan doloron, vi devas tuj

<sup>1</sup> El *Dave Barry en Kiberspaco*.

\*!@!\$)\$%&\*^)\$#\$.\$\*^&

Se necese, telefonvoku la postvendan servon de la entrepreno, laŭ la 1800-numero sur la skatolo, kaj atendu teknikiston, kiu klarigos al vi, paŝon post paŝo, ĉiujn necesajn kondiĉojn kaj postulojn por adoptado de infano inter 3- kaj 12-jaraĝa.

James Piton  
en VEKI 05/02/01  
represita el *La Lampiro* 7-8-9 2001 ☐

## PERLOJ EN MIA TAGO

de June Armstrong  
tradukis Henry Broadbent

El mia lito  
mi aŭdas  
plaŭdantajn ondojn  
sur la marbordo  
kaj tia ritmo  
balzamis mian animon

Ekster la fenestro  
stertoraj gruntoj  
de virkoalo —  
koalino krietas  
kvazaŭ perfortate  
inter pikantaj eŭkaliptoj

Frua sunleviĝo  
estas vekata  
de raŭkaj akacibirdoj  
pikantaj en la banksiojn  
ree birdoj pepadas dum  
ĉirkaŭsaltas en paroĵ  
pigoj aliĝe al kakofonio ☐

## La Libroservo de AEA

The office area in Esperanto House has been rearranged and fitted out with new furniture to facilitate the use for both Federation and AEA Libroservo staff. A new computer has been purchased on behalf of AEA for

the Libroservo accounts and Margaret Bambery employed by AEA to carry on Libroservo work. Margaret works dilligently and puts in far more time than the agreed hours.

[From *Teloŭeo* Dec. 2001] ☐

## Esperanto per Windows

Se vi deziras uzi Esperanton per via Windows-sistemo, sed ne deziras pagi altan sumon por aĉeti la Esperantan tekstprilaboran programon ĈAPELILLO, nek kontentas pri la trokomplekseco de SUPERSIGNO, ni povas disponigi al vi programeton kiu ebligas ke vi tre facile Esperantumadi uzante UNIKODON, en ĉiu programo via kiu kapablas skribi/legi UNIKODON.

Nia programeto estis preparita por utiligo en la pretigado de *ESK*, sed ni volonte disponigos ĝin senpage al kiu ajn deziras ĝin por sia PC.

Ni povas sendi la programeton per Interreto. Por akiri ĝin, bonvolu kontakti la redaktoron ĉe

[sudakruco@sudakruco.org](mailto:sudakruco@sudakruco.org)

Via Redaktoro. ☐



POR RIDIGI  
VIN



Batalis Melburnano kaj Adelajdano pri magia lanterno. Subite elsaltis el la lanterno belega spirito dirante: “Mi plenumos al vi po unu deziron !”

Diris la Melburnano: “Mi deziras grandegan muron ĉirkaŭ Melburno por protekti nian kulturon. Ĝi estu 25 metrojn alta por ke nenio povu en-kaj eliri!”

“Jam farite”, diris la spirito. Sin turnante al la Adelajdano li demandis: “Kion vi deziras ?”

Respondis la Adelajdano ridetante: “Plenigu ĝin per akvo !” [El *Tamen Plu*] ☐

## Nia konkurso: rezultoj?

La konkurso anoncita en nia lasta numero de *ESK* estis trovi kiom da vortoj oni povas formi el la literoj en la vorto *esperanto*. Ĉiu vorto devas havi almenaŭ ses literojn, kaj konsisti nur el oficialaj radikoj.<sup>1</sup>

Jam donitaj en la konkursteksto estis la vortoj *ansero*, *aresto*, *arseno*, *aserto*, *Ernesto*, *espero*, *eterna*, *pantero*, *pasero*, *pastro*, *penetra*, *pentas*, *pentras*, *peranto*, *persona*, *portas*, *presanto*, *senpera*, *serena*, *serpento*, *sperta*, *teraso*, *tereno*. La konkurstasko estis, do, trovi pli da fareblaj vortoj oficialaj. Jen la kontribuoj senditaj al ni:

De Vera Payne:

aserte, ansere, arestos, areste, entera, penseto, pensero, persone, pentre, pentros, penetros, penetras, penetro, presante, perante, persone, ranpesto, raspero, sentera, senpesta, sperte, sperto, sapero, terasa, tenera, tenero, terna. [Ensume: 27 vortoj.]

Ĉar neniu alia respondo al la tasko atingis nin, ni plilongigas la respondo-templimdaton ĝis 10 februaro 2001. □



## Gramatika angulo



### Kio estas pronomo? de Marcel Leereveld

Ni havas nomojn (vortojn) por ĉiuj regule menciataj animaloj, plantoj, objektoj, karakteroj, kaj abstraktaj ideoj: ekzemple, *tigro*, *arbo*, *hakilo*, *grandeco*, *zorgo*. En gramatiko ni nomas tiujn nomojn SUBSTANTIVOJ.

Ni havas nomojn (vortojn) ankaŭ por kvalifikoj kiuj aldonas pliajn informojn pri tiuj substantivoj, ekzemple, *alta*, *manĝanta*, *arĝentfolieca*, *antaŭa*. Ni nomas tiujn vortojn ADJEKTIVOJ.

Ni havas nomojn (vortojn) ankaŭ por agoj, ekzemple, *kuris*, *staru*, *venus*, *aligi*, *retrosendatos*, *helas*. Ni nomas tiujn vortojn VERBOJ.

Ni havas nomojn (vortojn) ankaŭ por kvalifikoj kiuj aldonas pliajn informojn pri verboj, pri adjektivoj, pri numeraloj, kaj pri aliaj nesubstantivaj vortoj, ekzemple, *forte*, *tre*, *preskaŭ*, *nur*, *tro*. Ni nomas tiujn vortojn ADVERBOJ.

Ni havas nomojn (vortojn) ankaŭ por indiki la nombron da substantivoj (aŭ da verboj, kelkfoje), ekzemple, *dek tri*, *kvaropo*, *kvinobla*, *sesfoje*, *sepono*, *trideka*, *dekoblige*. Ni nomas tiujn vortojn NUMERALOJ.

Notu ke la numeraloj estas **aŭ** adjektivoj (*kvar*, *kvara*, *kvarpoa*, *sesfoje*, *kvinobla*, *dek tri*), **aŭ** verboj *kvaroblige*, *kvarpoi*, *plimultiĝi*).

<sup>1</sup> Ĉar estis iom da konfuzo pri ĉi tio, ni atentigas ke *Plena Vortaro* kaj *Plena Ilustrita Vortaro* ne estas oficialaj vortaroj, kaj en ili troviĝas multegaj neoficialaj vortoj. “Oficiala” radiko/vorto estas nur radiko/vorto troviĝinta en *Fundamento de Esperanto*, en unu el la ok *Oficialaj Aldonoj al la Fundamento de Esperanto* faritaj de la Akademio de Esperanto, aŭ aparta decido de la Akademio de Esperanto.

Kiam ni parolas aŭ skribas, ni ofte uzas la saman vorton plurfoje:

*Hieraŭ mia patrino lavis mian ĉemizon.*

Por eviti tian tedan ripetadon ni uzas malgrandajn vortojn anstataŭ la ripetataj vortoj:

*Hieraŭ mia patrino lavis mian ĉemizon kaj hodiaŭ ŝi sekigas ĝin. Morgaŭ ŝi glados ĝin.*

Ni nomas tiujn ĝeneralajn vortojn, kiuj ripetas kaj anstataŭas aliajn specifajn vortojn, PRONOMOJ.

La PRONOMOJ anstataŭantaj substantivon aŭ verbon aŭ prepozicion havas substantivan karakteron/funkcion.

La PRONOMOJ anstataŭantaj adjektivon (aŭ adjektivan prepozitivan<sup>1</sup>) havas adjektivan karakteron/funkcion.

La PRONOMOJ anstataŭantaj adverbon (aŭ adverban prepozitivan<sup>1</sup>) aŭ numeralon havas adverban karakteron/funkcion.

Jen tipaj ekzemploj:

#### ANSTATAŬ SUBSTANTIVO:

mi, ci, li, oni, ni, vi, ili

tiu, iu, kiu, ĉiu, neniu

tio, tio, kio, nenio, ĉio

Ekzemploj:

La homoj ne ŝtelu → *Oni* ne ŝtelu

Ĉu S-ro X aŭ S-ro Y loĝas tie? → *Kiu* loĝas tie?

Folioj kaj branĉoj ne plu kuŝas sur la tegmento → *Nenio* kuŝas sur la tegmento.

#### ANSTATAŬ ADJEKTIVO AŬ ADJEKTIVA PREPOZITIVO:

Mi preferas ruĝajn rozojn → preferas *tiajn* rozojn

La aŭto de via najbaro → *Ties* aŭto

Ĉu la blua aŭ la verda aŭto → *Kiu* aŭto

Ĉu je la naŭa aŭ la deka horo → *Je kioma* horo?

La aŭto de Marcelo → *Mia* aŭto.

<sup>1</sup> Prepozitivo estas prepozicio kune kun substantivo, infinitivo, pronomo, aŭ numeralo sek-vanta ĝin, kaj kun eventualaj adjektivoj. Ekzemple: *Sur la alta turo; por sin lavi; kontraŭ ili; (dividi) per tri.*

**ANSTATAŬ VERBO:**

Ĉu vi ŝatas veti? → Ĉu vi ŝatas *tion*?

Ĉu vi skribas **aŭ** laboras **aŭ** legas? → Ĉu vi faras *ion*?

**ANSTATAŬ ADVERBO (AŬ ADVERBA PREPOZITIVO):**

Ŝi pentras en tiu maniero [aŭ: delikate] → Ŝi pentras *tiel*.

Ili revenis pro nekonata tialo → Ili revenis *ial*.

Mi posedas aŭtojn kaj domojn kaj helikopteron kaj miliardon da dolaroj → Mi posedas *multe*.

Li loĝas tiuloke → Li loĝas *tie*.

Jupitera homo vivis aŭ vivas aŭ vivos *neniam* [= en neniu tempo].

Li manĝas malgrandkvante → Li manĝas *iomete*.

**ANSTATAŬ NUMERALO:**

Mi manĝis kvar bananojn → Ĉu vi manĝis *tion*?

Li rakontis du aŭ tri aŭ kvar anekdotojn → *Kiom* [da anekdotoj] li rakontis?

Mi almetis ± dek sukererojn → Mi almetis *iom*.

**ANSTATAŬ PROPOZICIO (= FRAZO KUN ALMENAŬ SUBJEKTO KAJ VERBO):**

Mi scias ke ŝi foriris → Mi scias *tion*.

Ĉu necesas ke ni purigu aŭ ordigu aŭ forĵetu aferojn? → Ĉu *io* [aŭ: *nenio*] necesas?

*Se vi volas*, vi povas dividi la PRONOMOJN laŭ la sekvaj specoj (kategorioj):

1) **SUBSTANTIVAJ:**

mi, vi, [ktp]

iu, tiu, kiu [ktp]

io [ktp]

2) **ADJEKTIVAJ:**

mia, via [ktp]

iu [ktp]

ia [ktp]

multa, kelka

tioma, kvara, kvar [ktp]

ies [ktp]

iea [ktp]

3) **ADVERBAJ:**

iel, tiel, kiel, ĉiel, neniel

ial, tial [ktp]

iam [ktp]

ie [ktp]

Ĉi tiu divido estas scienda por la ekzamenoj.

*Se vi volas*, vi povas dividi la pronomojn laŭ la sekvaj klasoj:

1) **PERSONAJ PRONOMOJ:**

mi, vi [ktp], si

2) **POSEDAJ PRONOMOJ:**

mia, via, sia [ktp]

ies [ktp]

3) **INDIKAJ PRONOMOJ:**

tiu, tial, tia [ktp]

4) **RILATAJ PRONOMOJ kaj DEMANDAJ PRONOMOJ:**

kiu, kiel, kia, kiom [ktp];

kioma [ktp]

5) **NEDIFINAJ PRONOMOJ:**

io, ia, ies [ktp]

kelkaj, multaj, pluraj

6) **INKLUZIVAJ PRONOMOJ:**

ĉiu [ktp]

tuta

7) **EKSKLUZIVAJ PRONOMOJ:**

neniu [ktp]

Ĉi tiu divido estas scienda *ne* en la unuaj kvar ekzamenoj.

Tiujn pronomojn kiuj havas kiel centran literon la literon *-i-* (*io, kiu, neniom, ĉia* [ktp] oni nomas **KORELATIVOJ**, sed nur pro la formoj kaj la signifoj, ne pro iliaj gramatikaj karakteroj kaj funkcioj. □

## Ŝercaĵo?

Sviso serĉanta sian vojon alvenas ĉe bushaltejo, kie du Angloj estas atendantaj:

“Entschuldigung, können Sie Deutsch sprechen?” li demandas.

La du Angloj restas sen reago.

“Excusez-moi, parlez-vous français?”

Neniu efekto.

“Parlare italiano?”

Neniu respondo.

“Hablan Ustedes español?”

Ĉiam nenio.

La Sviso lasas ilin, treege seniluzigite.

Unu el la Angloj turnas sin al sia flankulo kaj diras al li:

“Vi sciu, eble ni devus lerni fremdan lingvon...”

“Por kion fari?” respondas al li la alia, tiu ulo konas kvar kaj tio ne utilis al li!”

[de Henri Masson

Rete: [esperohm@club-internet.fr](mailto:esperohm@club-internet.fr)

□





## El la Regionoj



**Okcidenta Aŭstralio:** La plej granda parto de la mono akirita per aŭkcio en Nedlands je la 21 de oktobro estos utiligita por parte pagi la kurackostojn por artisto Drewfus Gates. Li estis grave bruligita en triodi<sup>1</sup>-incendio en septembro.

Preskaŭ 1000 personoj vizitis la Galerion Cullity por rigardi 240 pentraĵojn donacitajn de aliaj artistoj por helpi lin kaj lian edzinon Chelinay.

La celsumo de la aŭkcio estis \$60 000. Se pli estos ricevita, ĝi estos uzata por kooperativo de artistoj kiun estas Ges-roj Gates.

[Tr. el *La Nigra Cigno*]

**Qld:** Dum julio, du francaj Esperantistoj (junuloj), Rachel Prual kaj David Cholet vizitis ĉi tiun regionon. Ili gastis unue kun Hazel Green, en Oakey, kaj poste kun mi en Brisbano. Dum unu jaro ili vojaĝis en Afriko, la Mez-Orientaj landoj, kaj Azio, antaŭ ol veni al Aŭstralio.

Post la vizito al Brisbano, ili flugveturis al Usono por pasigi alian jaron, vojaĝante en Nord- kaj Sud-Ameriko. Je la 9a de novembro, ili sendis ret-mesaĝon por diri ke ili estas nun en Sud-Ameriko. Tre aventurema paro, ĉu ne?

Alia gasto kiu vizitis nian landon kaj uzis PASPORTAN SERVON, estis Fabiana Colombo, juna Esperantistino el Italio. Ŝi gastis kun Esperantistoj en Melburno, Sidnejo kaj kun mi en Brisbano. Ŝi akompanis min al U3A klaso, kaj la klasanoj povis paroli kun ŝi Esperante — bona ekzerco

por ili! Poste, ŝi flugis al Japanio kie ŝi restis kun amikino kaj ekzercis sin pri la Japana lingvo. Jes, ŝi ankaŭ parolas la Japanan lingvon (kaj la Anglan, sed mi ĵuras ke dum ŝia restado kun mi, ni parolis nur Esperanton!).

Je la 5a de aŭgusto, ĉe nia pikniko en la Botanika Ĝardeno, ni bonvenigis Esperantistinon el Anglio, Beatrice Clarke. Beatrice kutime vizitas sian fratinton ĉe la Ora Marbordo ĉiujare, kaj ĉiam telefonas al mi por aranĝi renkonton.

Kaj fine, je la 18a de novembro, Caroline kaj mi povis interparoli kun vizitanto el Dublino, Irlando — Joy Davies. Ŝi restas kun parencoj en Brisbano kaj kaptis la okazon renkonti kelkajn lokajn Esperantistojn.

[De Kay Andersen, en *Brisbana Babilado*] □



## POR RIDIGI VIN



Ĉeestis ĉevalaŭkcion malgranda Joĉjo kune kun sia paĉjo. Joĉjo rigardis dum Paĉjo iris de ĉevalo al ĉevalo tuŝante la krurojn, postajojn kaj bruston de la bestoj.

Kelkajn minutojn poste Joĉjo demandis: “Paĉjo, kial vi faras tion?”

“Ĉar mi eble aĉetos tiujn ĉevalojn.”

Maltrankviliĝis Joĉjo kaj li diris: “Paĉjo, ni prefere iru hejmen tuj.”

“Sed kial?” demandis Paĉjo.

“Ĉar la poŝtisto venis hieraŭ, kaj mi timas ke li intencas aĉeti Panjon!”

<sup>1</sup> Spinifex

## Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

Tuj post la anonco pri la Tutmonda Pingvena Esperanto-Asocio (TPEA) en mia artikolo en la lasta *ESK*, mi ricevis informon<sup>1</sup> pri la fondiĝo de konkura Universala Fenikoptera Asocio Esperantista (UFAE). Laŭ la letero akompaninta la ĉisuban foton, la nova UFAE celas anstataŭi la skandalplenan UEA (kies centraoficeja stabo plejparte ekzistis fine de 2001), kaj ĝi proponas inviti la Antarktikan Pingvenan Asocion fariĝi landasocia filio. Inter la direktoroj de la nova UFAE estiĝis multa kveralado pri tiu propono, parte ĉar pingvenoj ja ne estas fenikopteroj, kaj ilia Asocio devus esti “kunlaboranta landasocio”; kaj parte ĉar kelkaj es-

<sup>1</sup> Nu, maleblas per la fotoj distingi inter inaj kaj virseksaj fenikopteroj, do povas esti ke min atingis virformo anstataŭ informo, aŭ – se skribis al mi grupo – geformo.

traranoj komprenis la vorton “filio” kiel signifantan “filo-lando”, dum ankoraŭ aliaj insistis ke necesas (tial) diri “filujo”<sup>2,3</sup>

La 1an de aprilo mi festos mian 734an naskiĝtagon. Ĉar malofte oni naskiĝas 734-foje, estos granda festo miahonore en la Granda Halo de la Internacia Asocio de Presmisistoj, en la tria neĝdomo de maldekstre, Antarktiko. Nepre renkontu min tie!

<sup>2</sup> Jam estiĝis skismo en la Antarktika Pingvena Asocio pro disputo ĉu la nomo de la lando estu “Antarktiko” aŭ “Antarktikio”, kaj furiozoplena batalo inter la i-istoj kaj uj-istoj nun dividas la pingvenan mondon.

<sup>3</sup> Necesas memori ke, ĉar pingvenoj ne povas flugi, firma kaj nesuebla fundamento estas nepre necesa, laŭ ili; fenikopteroj malpli bezonas tian netuŝeblan fundamenton, ĉar ili povas forflugi kiam ajn teroristo minacas skui ĝin. □



Unua Ĝenerala Kongreso de la Universala Fenikoptera Asocio Esperantista

**LA AŬSTRALIA KAJ LA  
NOV-ZELANDA**

**ESPERANTO-ASOCIOJ**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.  
☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); : 03 9905 3668 (BH).  
[esperanto@education.monash.edu.au](mailto:esperanto@education.monash.edu.au)

**Vicprezidantoj:**

*Franciska Toubale*, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.  
[franciska@bigpond.com](mailto:franciska@bigpond.com)

*Hazel Green*, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

[hazgreen@tmba.design.net.au](mailto:hazgreen@tmba.design.net.au)

**Sekretario:** *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.  
[abcetc@ozemail.com](mailto:abcetc@ozemail.com)

**Vicsekretario:** *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.  
☎ (08) 8242 1460.  
[esperantobob@picknowl.com.au](mailto:esperantobob@picknowl.com.au)

**Kasisto:** *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.  
[Pitney@Cybernetint.net](mailto:Pitney@Cybernetint.net)

**Vickasisto:** *Frank Braham*, 5 Marriot Rd, Moorabbin Vic 3189.  
[fbraham@aol.com](mailto:fbraham@aol.com)

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

**Prezidanto:** *Bradley McDonald*, PO Box 12 103, Auckland 1135.  
☎ 09 579 4767, ☎ 09 579 1070.  
[neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz)

**Sekretario:** *Howard Gravatt* PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.  
☎ 09 626 6129.  
[hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

**Kasisto:** *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007. ☎ 09-826 2081. [brianandjackie@abztrak.co.nz](mailto:brianandjackie@abztrak.co.nz)

**KOTIZOJ:**

**Aŭstralia Esperanto-Asocio:**

<http://www.esperanto.org.au/esk>  
AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

**Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:**

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: *Jackie Fox*, Unit 89 Crestwood Village, 38 Golf Road, Titirangi Auckland 1007.

**Unuopaj ekzempleroj de Esperanto sub la Suda Kruco:** Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendo de la Libroservo de AEA.

**Abonoj ekster Aŭstralazio:** €23.70, pagu al la konto ael-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

**Artikoloj** de aŭtoroj nomitaj estas © 2002 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2001 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

**Ĉi tiu numero** de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

Specialaj kunlaborantoj:  
*Odlo Bokserp*, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T  
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj  
*Vera Doloro*, L.M.K.  
[lia multsuferanta kontrolanto]

La estraro de la Tutmonda Pingvena Esperanto-Asocio kaj ĉiuj premsistoj de la Galaksio

# *For the Beginner*

by Donald Broadribb

## **Pronunciation**

Probably the most difficult aspect of learning another language is the pronunciation. Most of us find it far easier to write and read than to speak another language and to understand it when spoken. Esperanto, though easier to pronounce than most of the world's languages, also presents problems that all too often are passed over in silence by textbooks. The principal reason for this is that the various regional forms of English throughout the world pronounce individual sounds in very different ways.

**o:** The IPA<sup>1</sup> symbol for the Esperanto sound is /o/. The *Fundamento de Esperanto* specifies:

ô as in French

o as in “not” in English

o as in German

o as in Russian

o as in Polish

For Australians the problem is that Australian pronunciation of English does not use the sound of the French ô and the German-French-Polish o's

Most Australian Esperantists are taught that for the Esperanto *o* they should pronounce “aw” as in “law”, which is the nearest sound in standard Australian pronunciation. Americans, on the other hand, are taught to pronounce *o* as in “hope”, which is the nearest equivalent in standard American pronunciation.

Properly, Esperanto *o* is somewhere between the two.

---

<sup>1</sup> International Phonetic Alphabet

American Esperantists are often accused of pronouncing their *o*'s as diphthongs (*o* followed by a very brief *w*, as in "low"). Australian Esperantists are often accused of pronouncing a totally non-Esperanto sound.

Since neither pronunciation presents a problem for understanding of Esperanto, once the hearer is used to it, it is probably not too important which of these sounds is used.

- r:** Here the problem becomes more serious, since the sound of *r* has disappeared in Australian (and British) English except at the start of words and between vowels. The textbooks stress that *r* must always be pronounced, but give little help on how to do this.

There is no "official" standard for the pronunciation of *r*, apart from the none-too-clear statements in the *Fundamento de Esperanto*.

According to the *Fundamento*, the sound of *r* is to be:

r as in French

r as in "rare" for English

r as in German

p as in Russian

r as in Polish

We are dealing with several variants of the *r*-sound, in this list.

The consensus among Esperantists internationally is that as long as *r* is clearly pronounced as a distinct sound, it is not very important which of the *r*'s is used.

Australians are often taught to "trill" the *r* when speaking Esperanto — in order to ensure that an *r* is pronounced before consonants, at the ends of words, etc. I have even heard discussion of how many "flaps" the tongue should make when pronouncing *r*.

Internationally, the Spanish trilled sounds of *r* and *rr* are not usual in Esperanto.

**a:** Here the problem is that in Australian English we are accustomed to think of the *a* in “fat” and the *a* in “far” as two variants of the same thing. The *Fundamento*’s listing of the desired sound is as in French *â*, English *a* in “last”, and German-Russian-Polish simple *a*.

Internationally, Esperantists are agreed that the sound of the French *â* gives the clue here. For some Australians this is also the sound in “last”, for others it is not.

For most non-English speaking Esperantists, the sound Australians give to *a* in “fat” is heard as a form of the sound of *e*.<sup>1</sup> Thus they hear the American-Australasian-English pronunciation of the word “Macintosh” as *mekintoŝ*.

Please try hard to avoid saying the *a* in “fat” for the Esperanto *a*, it really will improve your Esperanto speech no end.

**Accented syllable:** the rule in Esperanto is that the next to last vowel (*a, e, i, o, u*) of each word is to receive the stress accent. Thus:

Esperanto

hodiaŭ

majo

aŭdas

semajno

benko

Aŭstralio

radio

It is not unusual for American-Australasian-British

---

<sup>1</sup> In terms of the position of the speech organs, *a* as in “fat” is, actually, very close to the position of the throat, lips, and tongue in pronouncing the *e* in “met”, and rather distant from their position in pronouncing *â* in French *âme*.

speakers to forget that the *i* in words ending with *-io* is to be given the stress accent.

**Diphthongs:** There are some diphthongs in Esperanto that present problems for some speakers. A “diphthong” is a combination of two letters that when together make a special sound.

The Esperanto diphthongs are:

- aŭ* We use this often in English, as in the word “**loud**”; in Esperanto *laŭd-* has the same sound
- aj* This sound is also common in English, as in the word “**ride**”, which in Esperanto *rajd-* has the same sound
- eŭ* We have no equivalent in standard English. But in non-standard English we have a sound fairly close to it, as when some people who find it hard to pronounce the letter *l* say “help” as if it were “hewp”
- ej* As in the English word “**they**”. A sample Esperanto word is *plej* (meaning “most”). In Australian English our nearest approximation is the word “play”.
- oj* As in the English word “**boy**”; the Esperanto *boj-* (meaning “bark”) has the same sound.
- uj* Unfortunately this sound is not found in English, and often gives English speakers trouble. It happens to be in some very frequent Esperanto words, such as *tuj*. You will have to ask an experienced Esperantist to demonstrate the sound (unless you speak Dutch!).

In Esperanto, *j* and *ŭ* are never considered as separate vowels, even though in some other languages they may be. In Esperanto a preceding *a*, *o*, or *u* carries the accent.